# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 2 (869) • 2008 •

100 JAROJ

DIA REGNO

ISSN 0167-9554




Artisto: Václav Lamr, Ĉeĥio

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel Polnický;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
✆ +420 325 615 651;
💻 cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
✆ +49 7131 162688;
💻 siegfriedkrueger@arcor.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574;
💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel Polnický
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Preĝo por la judoj je Sankta Vendredo | 27 |
| Elmonaĥejaj promenadoj | 29 |
| Babilante revenvoje el la kongreso | 30 |
| Rembrandt kaj Emaus | 31 |
| Kredkonfeso por nia tempo | 34 |
| Unu ringo | 36 |
| La Dia telefonnumero | 37 |
| Ne licas ŝanĝi kion Kristo konstituis | 38 |
| Montrinte Adoru-kantlibron | 39 |
| Lutero estos rehabilitata | 40 |
| Kuriokardinalo Kasper alvokis ĉiujn kristanojn al nova ekumena eliro | 41 |
| El Dia Regno 1938 kaj Fajszi kolekto | 42 |
| Invitoj al seminario kaj bibliaj tagoj | 44 |
| Informetoj | 46 |
| Ili pace protestas | 47 |
| Sen Dio mi estas ... | 48 |

## REDAKTORAJ VORTOJ

Estas interese redakti la Dian Regnon kaj je la fino de la laboro, provi iel trovi iun temon en la gazeto. Kompreneble mi influas pro mia elekto de tekstoj sed plejparte la kontribuoj venas sen iu peto aŭ sistemo kaj mi ne havas grandan stokon el kiu mi povas ĉerpi. Do mi preskaŭ tuj uzas kion oni sendas al mi.

Kiam mi komencis la nunan numeron, mankis al mi iu paska artikolo sed tamen, laŭ mi, tiu ĉi numero enhavas multajn kontribuojn, kiuj en ĝusta tempo ĉirkaŭ la Pasko temas pri nia kristana kredo, nia bazo kaj nia sinteno al ĝi. Ĉu tio ne estas paska temo? Nia kredo ja baziĝas sur la historia fakto ke Jesuo mortis por ni!

# Preĝo por la judoj je Sankta Vendredo

Jacques Tuinder, NL

*Oremus et pro perfidis Judaeis: ut Deus et Dominus noster auferat velamen de cordibus eorum...*

"Ni preĝu ankaŭ por la perfidaj Judoj: ke nia Dio kaj Sinjoro forprenu la vualon de iliaj koroj, por ke ankaŭ ili agnosku nian Sinjoron Jesuon Kriston. – Dio potenca kaj eterna, kiu eĉ la perfidecon de la Judoj ne ekskludas de Via kompatemo, elaŭdu niajn preĝojn, kiujn ni direktas al Vi pro la blindeco de ĉi tiu popolo; por ke ili agnosku Kriston, la Lumon de Via vero kaj fortiriĝu el ilia mallumo. Per la sama Jesuo Kristo, nia Sinjoro, kiu vivas kaj regas kun Vi en la jarcentoj de l' jarcentoj. Amen".

Tiel tekstis en la periodo 1570 - 1959 unu el la preĝoj kadre de la rom-katolika liturgio je Sankta Vendredo. Ĝi estis la sola preĝo, ĉe kiu la kredantoj ne kliniĝis, kiel jarcentojn longa riproĉo, 'ke la Judoj surgenue mokis la krucumitan Jesuon'. En 1959 iom korektiĝis ĉi tiu eksterordinare duba kaj misgvida preĝoteksto. Dum la papeco de Johano XXIII la liturgia komisiono forigis la vortojn perfidis kaj perfidan, sed cetere restis la preĝo titolita 'Por la konvertiĝo de la Judoj'. Nur en 1965 la Dua Vatikana Koncilio (en 'Nostra aetate') finfine eliminis la terminon 'di-murdistoj' por indiki la judan popolon, kaj en 1969 la preĝoj je Sankta Vendredo estis nove formulataj. La preĝo nune tekstas:

*"POR LA JUDA POPOLO. Ni preĝu ankaŭ por la juda popolo, kiun nia Dio kaj Sinjoro kiel unuan alparolis: ke Li faru ĝin granda per amo por Lia sankta nomo, per fideleco al Lia interligo. (...) Dio potenca kaj eterna, Vi konfidis Vian promeson al Abrahamo kaj al lia popolo. Elaŭdu indulge la preĝojn de Via eklezio; ke la popolo, kiun Vi kiel unuan kolektis, venu al pleneco de savo. Per Kristo, nia Sinjoro. Amen".*

Je peto de kelke da konservemaj grupiĝoj papo Benedikto XVI pasintan jaron permesis grandskale okazigi la tridentinan meson, inkluzive de la tiama preĝo pri la 'blindeco de la Judoj'. Kompreneble tio kaŭzis seniluziiĝon kaj koleron ĉe juda kaj kristana flankoj.

Benedikto, sekve, decidis adapti la tekston. La 5-an de februaro 2008 la nova (latina) teksto oficiale konatiĝis. Mi traduku jene:

> *"Ni preĝu ankaŭ por la Judoj, ke nia Dio kaj Sinjoro lumigu iliajn korojn, por ke ili agnosku Jesuon Kriston savanto de ĉiuj homoj.*
> *– Dio potenca kaj eterna, kiu volas ke ĉiuj homoj saviĝu kaj venu al kono de la vero, donu kun favoro ke, kiam plene eniros la nekredantoj en Vian Eklezion, saviĝu tuta Israelo".*

Nu, la teksto sonas 'malpli akre', sed ĝi tamen estas malaprobinda. Certe, ĝi ne plu nomas la Judojn blindigitaj, sed iliaj koroj evidente estas ankoraŭ mallumigitaj kaj do nepras 'lumiĝi'. En la lasta frazo ŝajnas kvazaŭ la Judoj kungrupiĝus inter la nekredantoj; ĝi estas tro konciza kaj konsekvence miskompreniga referenco al la dek unua ĉapitro en la Epistolo al la Romanoj pri Israelo kaj la nekredantoj (nacianoj aŭ paganoj). Kaj fine oni ne preĝas, ke Judoj kaj nekredantoj eniru en la Regnon de Dio, sed en 'Vian Eklezion'. Alivorte: ĉu Judoj estas nur 'savitaj', kondiĉe ke ili romkatolikiĝu?

Ĝi estas opinio, kiun ni trovas ankaŭ inter protestantoj: ke ni kiel Eklezio aŭ individuaj kristanoj estus vokitaj por 'konverti' Judojn. Tio estas giganta miskompreno! Bone legante tiun dek unuan ĉapitron el la Epistolo al la Romanoj, ni konsciiĝu pri tio, ke ni estas paganoj, 'kiel sovaĝaj branĉoj greftitaj al la olivarbo'. "...Sciu do ke ne vi portu la radikon, sed la radiko vin".

Protestantoj en Nederlando prave nov-formulis la preĝon por Israelo jene:

> *"Ni preĝu por Israelo, vokita de la Sinjoro kiel unuaĵo meze de la popoloj.*
> *Ni preĝu:*
> *Dio fidela, Vi konfidis viajn promesojn al Abrahamo kaj lia idaro, por ke ĝi estu beno por ĉiuj popoloj. Konservu vian popolon ĉe tiu interligo kaj plirapidigu la tagon de la Mesio, por ke la lando de promeso estu lando de ĝojo por ĉiuj viaj hom-infanoj.*
> *Per Jesuo Kristo, nia Sinjoro. Amen"*

El la Epistolo al la Romanoj 11:
**17** Sed se kelkaj el la branĉoj derompiĝis, kaj vi, estante sovaĝa olivarbo, engreftiĝis inter ili kaj fariĝis partoprenanto en la radiko kaj graso de la olivarbo, **18** ne fieru super la branĉoj; sed se vi fieras, ne vi portas la radikon, sed la radiko portas vin. **19** Vi do diros: Branĉoj estis derompitaj, por ke mi estu engreftita. **20** Bone; pro nekredemeco ili estis derompitaj, kaj vi staras per via fido. Ne tenu vin alte, sed timu; **21** ĉar se Dio ne indulgis la naturajn branĉojn, Li ankaŭ vin ne indulgos.

# Elmonaĥejaj promenadoj

Jacques Tuinder, NL

Vera kaj mi la 15-an de marto pasinta partoprenis pilgrimkarakteran promenadon, kiun ĉiujare organizas la abatejo, en kiu mi volontule deĵoras. La ĉijara temo estis 'Vojo de Amo'. La interesiĝo pri tiaj aranĝoj estas grandega. Vere temas pri nova, rapide disvastiĝanta, fenomeno. Montriĝas ke multaj homoj, nelaste ankaŭ junaĝaj, denove serĉas sian vojon tra la vivo kiu tiel ofte ŝajnas labirinto.

Anoncis sin por la tago pli da homoj, sed la nombro estis limigita je cento. La programo komenciĝis je 9.30 horo per diservo. Poste ni komune trinkis kafon, dum kiu kunveno la nin akompananta monaĥo ekzercis kun ni kelkajn kantojn kaj faris mallongan meditadon enkondukan.

Tiam ni komencis promeni, kaj la unua celo estis la ejo, en kiu unu el la unuaj nialandaj misiistoj en la sepa-oka jarcento predikis la evangelion. Ili estis monaĥoj kiuj jam vivis laŭ la Regulo de sankta Benedikto. Tie ni kantis laŭ Taize-tradicio:

*"Konduku nin hejmen,*
*Al ni vivon donacu,*
*Meze de ni nia Dio!"*

Kiam ni forlasis ĉi tiun lokon, kie estiĝis fonto sur la iama tombo de sankta Adelberto, ni silente daŭrigis pilgrimi. La tuta promenado tra belega duna regiono tre varia kaj inspira, estis ĉirkaŭ 15 km. Duonvoje ni faris ripozopaŭzon, en kiu ni komune manĝis, trinkis, babilis, preĝis kaj kantis.

Je la dua horo ni denove vizitis la pilgrimlokon, dediĉitan al Adelberto, kantis kaj preparis nin por la lasta parto de la promenado.

Duonhoron poste ni alvenis en la abateja preĝejo, kie frato Adri nin benis per spontane formulita pilgrimbeno. Tie ni kantis, petante al Dio ke Li antaŭu nin per Sia lumo.

*"Li benu per Paco kaj Ĉio Bona nin, niajn geamikojn kaj ĉiujn homojn ĉirkaŭe".*

Estis belega, inspira sperto silente, 'monaĥume', iri grupe tra ripoziga pejzaĝo kaj ebligi al nia animo libere en- kaj elspiri. Ni spertis tre konkrete kaj senteble kiel mirakle rapide fremdaj homoj, kiuj antaŭe neniam renkontis unu la alian, interfratiĝas - mi diru: 'ni-iĝas'!



# Babilante revenvoje el la ekumena kongreso

Armondo ZECCHIN, IT

La evangelioj estas kodo de deviga konduto por la eklezio kaj por la tuta kristanaro: kodo preta, brila, facile komprenebla kaj konsentebla, kvankam rilate ĝin multe oni diskutis.

Ĉi tie tamen, oni ne volas pritrakti tian brilan normecon, sed estas celata la rajto de evangelioj esti konsiderataj tiaj: nome kiel fonto deviga rilate la moralan interhoman konduton kaj kiel ununura fonto de dogmoj koncernantaj ĉu Jesuon mem ĉu la naturon kaj funkcion de la eklezio. Jen tial la demando: Ĉu la evangelioj akiris/as sian definitivan kaj originan valoron el la eklezio aŭ estis ili mem kiuj donis aŭtentigan valoron al la eklezio. Alivorte: okazas ke la evangelioj ricevas aŭtoritaton **el** la eklezio aŭ ili donas aŭtoritaton **al** la eklezio. Plue alivorte: ĉu la evangelioj apogiĝas sur la eklezio kaj ekster ĝi ili valoras nur kiel bela literaturaĵo?

Al tiu diskuto diversaj partoprenis revenante el la ekumena kongreso de Pelplin: amika kaj amikiga diskuteto inter eble nur samkonfesantoj aŭ eble inter diverskonfesantoj.

Venkis neniu ĉar ne temis pri matĉo kaj ĉiukaze la konkludoj restis suraere. Utilas tamen, mencii la kvazaŭ-konkludojn kaj kelkan argumentaron:

– Laŭ iuj, eble el evangeliecaj flankoj, la evangelio estas normo kiu disciplinas kaj superregas la eklezion tutan: el ĝi devenas ĉio kredenda. Se eklezioj foriras el la evangelioj, ili perdas la karakterizon kristanan, ĉar evangelioj antaŭas ĉu valore ĉu rajte, kiel eklezia historio montras kaj kristanaj saĝoj instruis.

– Aliaj, eble katolikecaj, montris tre ŝati ke la eklezio antaŭis la evangeliojn, ke ĝi mem al ili rekonis valoron kaj ricevis de ĝi aprobon ĉar en ili ĝi sin rekonis. La eklezio, fakte, naskiĝis kaj kreskis antaŭ la apero de la skribaj evangelioj. Certe ĝi fontis kaj herediĝis el la evangelio same kiel diras Paŭlo, kiu mem iris mezuri sian evangelion kun tiu de aliaj apostoloj. Kaj certe kiam aperis la skribitaj evangelioj, ilin la eklezio juĝis kaj en ili ĝi sin rekonis: tial sen tia rekono la skribaj evangelioj povas esti historiajn dokumentojn, nenialplue. Laŭ tiu vidpunkto, tute naturas ke la skribaj evangelioj ne ĉion de la diaj komunikaĵoj entenus ĉar la antaŭa evangelio, vivanta en la parola ttradicia komunikado, estas la vera normo normiganta, kiu helpas kaj kompletigas la skribajn evangeliojn mem!

Tian konkludon kelkaj aplikis al la tuta lasta testamento!

Tamen estis iuj kiuj difinis la diskuton sensenca nome disputo pri kapra lano aŭ pri la flugiloj de la anĝeloj! Sed tiu opiniata franĝeto povis montri nenion ĉar la trajno jam estis atinganta la finan stacidomon kaj ĉiuj ekhastis al aviadilhaveno aŭ al alia trajno.

Kion komente diros KELIanoj kaj IKUEanoj? Ĉu diskuto pri io aktuala aŭ pri io jam seninflue forvaporiĝinta?

# Rembrandt kaj Emaus

Siegfried Krüger, DE

Rembrandt pentris dum la tuta vivo bildojn kun bibliaj temoj. Kelkaj raportoj refoje interesis lin, ja akompanis lin. Ekzemple pri la kompatema samariano ni havas 20 pentraĵojn.

El la NT altiris lin la rakonto de Apero de Kristo en Emaus.

Inter 1628 kaj 1661 estas 18 skizoj, akvafortoj kaj pentraĵoj konservitaj. La rakonto en liaj bildoj ŝanĝiĝas kaj li ĉiam pli profunde eniras la pensojn de la temo.

La unuan fojon en 1628 li pentris la rakonton 22-jaraĝa. Interesis lin ekde la komenco de sia pentroarto lumo kaj ombro, helo kaj malhelo, krepusko kaj noktiĝo, do ĉiu traktado de la lumo. Li lernis speciale en la dua parto de sia vivo, ke la lumo havas ankaŭ transcendan signifon, por ke la bildo ne nur spegulu religian temon, sed estu religia bildo.

La vivovojo de Rembrandt estas lumvojo en duobla senco. En la unua duono ĉirkaŭas lin brilo kaj famo. Pli poste la ekstera lumo de sia vivo malheliĝas. La sekvantaj 7 bildaj priskriboj spegulas ankaŭ la evoluon en lia vivo.

Luk 24, 13-32

*Kaj jen du el ili iris en tiu sama tago al vilaĝo nomata Emaus, kiu estas malproksime de Jerusalem sesdek stadiojn. Kaj ili interparolis inter si pri ĉio tio, kio okazis. Kaj dum ili interparolis kaj diskutis inter si, Jesuo mem alproksimiĝis kaj iris kun ili. – Sed iliaj okuloj estis malhelpataj tiel, ke ili lin ne rekonis. Kaj li diris al ili: Kiaj vortoj estas tiuj, kiujn vi interŝanĝas, dum vi iras? Kaj ili haltis, kun malgaja mieno. Kaj unu el ili, nomata Kleopas, responde diris al li: Ĉu nur vi sola loĝas en Jerusalem, kaj ne scias tion, kio tie okazis en ĉi tiuj tagoj? Kaj li diris al ili: Kion? Kaj ili diris al li: Pri Jesuo, la Nazaretano, kiu estis profeto potenca age kaj parole antaŭ Dio kaj la tuta popolo; Kaj kiel la ĉefpastroj kaj niaj regantoj transdonis lin por kondamno al morto, kaj lin krucumis. Sed ni esperis, ke li estas tiu, kiu elaĉetos Izraelon. Kaj plie, krom ĉio tio, hodiaŭ estas jam la tria tago, de kiam tio okazis. Ankaŭ mirigis nin iuj virinoj el inter ni, kiuj estis frumatene apud la tombo, kaj ne trovinte lian korpon, revenis, dirante, ke ili ankaŭ vidis vizion de anĝeloj, kiuj diris, ke li vivas. Kaj iuj el nia kunularo iris al la tombo, kaj trovis tiel, kiel diris la virinoj; sed lin ili ne vidis. Kaj li diris al ili: Ho malsaĝuloj kaj kore malviglaj por kredi ĉion, kion la profetoj antaŭparolis! Ĉu la Kristo ne devis suferi ĉion tion, kaj eniri en sian gloron? Kaj komencante de Moseo kaj de ĉiuj profetoj,*

*li klarigis al ili el ĉiuj Skriboj la dirojn pri li mem. Kaj ili alproksimiĝis al la vilaĝo, kien ili iris, kaj li ŝajnigis al ili, kvazaŭ li pluen iros. Kaj ili retenis lin, dirante: Restu ĉe ni, ĉar estas preskaŭ vespere, kaj la tago jam malkreskas. Kaj li eniris, por resti ĉe ili. Kaj dum li sidis kun ili ĉe manĝo, li prenis panon, kaj ĝin benis kaj dispecigis kaj donis al ili. Kaj iliaj okuloj malfermiĝis, kaj ili rekonis lin, kaj li fariĝis nevidebla por ili.* †) *Kaj ili diris unu al alia: Ĉu nia koro ne brulis en ni, dum li parolis kun ni sur la vojo, dum li klarigis al ni la Skribojn?*

†) speciale tiu frazo fascinis kaj instigis lin.

**Apero de Kristo en Emaus**
(bildoj inter 1629 kaj 1661)

1629 (vidu bildon) Ni vidas ekstreman timiĝon. Unu de la disĉiploj genuiĝas kaj kisas la robon de Jesuo. La alia retiriĝis timante. Rembrandt estas influita de la baroko. Al la lumapero mankas varmo.



1634 Ĉio ŝanĝiĝis. La ejo malgrandiĝis, ĉiuj tri sidas dense ĉekune. Nun li ankaŭ interpretas la versiklon 30 (Kaj dum li sidis kun ili ĉe manĝo, li prenis panon, kaj ĝin benis kaj dispecigis kaj donis al ili). Tute alimaniere la uzo de lumo kaj mallumo. Ĉiu lumo venas de Kristo.

1640 (vidu bildon) Denove pasis duona jardeko. R. estas je la pinto de sia vivovojo. Nun li aldonigas la versiklon 31 (Kaj iliaj okuloj malfermiĝis, kaj ili rekonis lin, kaj li fariĝis nevidebla por ili). Fulmo timigas la disĉiplojn, sed la bildo ankoraŭ ne estas tute religia bildo: ĝi estas tere interpretita.




1648 (1) (Vidu bildon) R. perdis de sia reputacio kaj mortis la edzino Saskia (1642). Li nun spertas, ke la Biblio ne nur estas fonto de historiaj eventoj, sed diras pli al tiuj, kiuj legas per “malfermitaj okuloj”.

(v29) Kaj ili retenis lin, dirante: Restu ĉe ni, ĉar estas preskaŭ vespere, kaj la tago jam malkreskas. Kaj li eniris, por resti ĉe ili.

(v32) Kaj ili diris unu al alia: Ĉu nia koro ne brulis en ni, dum li parolis kun ni sur la vojo, dum li klarigis al ni la Skribojn?

Nun Kristo ne plu estas la superulo, li nun estas unu el tiuj, al kiuj li estis sendita. La mesaĝo, kiun li alportas, lumigas lin (Luk 4,18).



1648 (2) Li nun verŝajne komprenas la veran sencon de la Emaus-travivaĵo. Ĉu li spertis, ke Kristo lin alproksimiĝas kaj ŝanĝas lin? La lumo nun venas de la kandelo kaj ne plu el Kristo. Liaj manoj rompas la panon kaj lia rigardo lumigas la internon (Luk 2,9).

1654 (akvafortaĵo) (vidu bildon) La figuro de Kristo maljuniĝis. R. societe travivas malhelajn momentojn, sed Kristo nun hele radias en la animo kaj la koro.



1661 (vidu bildon) Denove pasis 7 jaroj. Intertempe R. perdis sian tutan riĉaĵon. Nur malmultaj homoj restas fidelaj al li. La disĉiploj nun ne plu timiĝas. Nun la travivaĵo ne plu estas mirakla apero, sed miraklo, kiu al ili la internan okulon – la koron – malfermas.



# Kredkonfeso por nia tempo

## Eroj el prelego de la ekumena kongreso en Pelplin

Prelegis Peter Knauer SJ, BE

(Mallonge pri la unuaj paragrafoj)

Kiu estas “Dio”? La respondo ne estas facila, ĉar la kristana mesaĝo ĉiam asertis ke Dio estas nekomprenebla. Ke Dio estas nekomprenebla signifas ke Li ne konvenas al niaj nocioj.

Li estas nek elirpunto, nek objekto, nek rezulto de konkludoj aŭ deduktoj. Li estas pli granda ol ĉio kion ni povas pensi.

Nia tradicia kredkonfeso komencas: “Mi kredas je Dio, la kreinto de la ĉielo kaj de la tero”. Tio ne signifas: Mi *kredas ke* Dio estas la kreinto de la mondo. Sed: Mi kredas en la sindonemo de mia koro je Dio, kaj Li estas la kreinto kaj la kreanto de la mondo. La lasta estas la racia “defino” de Dio. Diri ke Dio estas la kreinto de la mondo ne estas deklaro de fido sed deklaro de la racio. Dio estas “sen kiu nenio ekzistus”... Esti kreata signifas ke ni rilatas reale nur unuflanke al Dio. Tio ankoraŭ ne estas komuneco kun Dio. Kiel do ni havos Dion favoran, se nenio kreata sufiĉas por meti nin en komunecon kun Dio?

La respondo venis al ni per Jesuo. La fido nur komencas (paragrafo du) kun Jesuo. Nia kristana mesaĝo, kiu havas sian originon en Jesuo, hodiaŭ diras al ni: Dio turniĝas al ni kaj al la tuta mondo en amo kiu ekzistas ekde la eterno kiel amo de Dio al Dio: amo inter la Patro kaj la Filo, amo kiu estas la Spirito Sankto. Sole enprenataj en tiu ĉi amo ni havas komunecon kun Dio.


La Filo enkarniĝis en Jesuo. Pro kio Dio iĝis homo? Mi respondo estas: por ebligi la parolon de Dio. Parolo estas komunikado inter homoj. Ne ekzistas aliaj paroloj ol la paroloj inter homoj. La nocio de parolo de Dio implikas la neceson ke Dio renkontu nin kiel homo.

En nia tradicia kredo ni diras nur ke Jesuo naskiĝis kaj mortis sur la kruco, sed ni ellasas ĉion kio okazis inter la naskiĝo kaj la morto. Tion ni legas en la evangelioj. Sed eble estus bone mencii tion ankaŭ en la kredo mem. Alie ni ne komprenas pro kio Jesuo krucumiĝis.

Sed la morto ne povis estri Lin: Por ĉiam Jesuo vivas en la gloro de Dio.

La resurekto de Jesuo signifas ke li estas la Filo de Dio ankaŭ vidalvide de la morto.

Mi kredas je Jesuo Kristo.
Li estis kaj estas la Filo de Dio.
Li mortis *por ni*.
Li resurektis.



## La kredkonfeso por nia tempo

1) Mi kredas sole je Dio kaj tiel nenion en la mondo mi bezonas diigi.

Ĉio, kio ekzistas, indikas pri Li. Nenio povas esti sen Li. Li estas potenca en ĉio, kio estas aŭ okazas. Li estas pli granda ol ĉio, kion ni povas sperti aŭ
pensi. Tiel Li "loĝas en lumo nealirebla".

Tion jam povas ekkoni la racio.

2) Sed ekde Jesuo mia konfido estas fido kiu transpaŝas la racion:

Mi estas ŝirmata en la amo de Dio. Dio turniĝis al ni kaj al la tuta mondo en amo kiu ekzistas ekde la eterno kiel amo de Dio al Dio: amo inter la Patro kaj la Filo, amo kiu estas la Spirito Sankta.

Sole enprenataj en tiu ĉi amo ni havas komunecon kun Dio.

3) La Filo, sendita en la Spirito Sankta, enkarniĝis en Jesuo per Maria kaj naskiĝis de ŝi por anonci al ni en homa vorto nian komunecon kun Dio.

Ĉar tiu ĉi amo ne havas mezuron en la mondo kaj pro tio ne ekkoniĝis ekde la mondo; nur per Lia vorto ni povas ekkoni ĝin:

Nenia povo de la mondo, eĉ ne la morto, povas elŝiri nin de nia ŝirmo, la amo de Dio.

4) Jesuo atestis tiun ĉi mesaĝon per la sindono de sia vivo:

Pro sia mesaĝo liberiga kaj pro tio ke li trovis disĉiplojn por ĝi li mortis sur la kruco far tiuj kiuj timigas la aliojn kaj tiel regas ilin. Sed la morto ne povis estri Lin:

Por ĉiam Jesuo vivas en la gloro de Dio.

5) Mi kredas je Li kiel en la Filo de Dio, kaj tio signifas:

Mi partoprenas en Lia rilato al la Patro. Surbaze de Lia vorto mi scias min kaj la tutan mondon vere adoptataj por la tuta eterno.

Tiel mi ne plu estu regata per angoro por mi kiu alie estas la radiko de ĉiu malbono.

6) Kredi en Jesuo kiel la Filo de Dio signifas esti plenigita de Lia Sankta Spirito.

Tiun kredon ni ne havas el ni mem, sed ni ricevas ĝin de la komuneco de tiuj kiuj kredis antaŭ ol ni, la eklezio; en ĝi la Sankta Spirito kunigas ĉiujn kredantojn kun Kristo kaj ilin reciproke.

Kiel Jesuo mem la kredantoj "estas naskitaj ne el la volo de viro, sed el Dio".

7) La tasko de la eklezio estas transdoni la vorton de Dio alvenintan al ni per Jesuo. La vorton de Dio akceptatan ni celebras en la sakramentoj.

En la eŭkaristio nia fido vivas de Jesuo mem kiel nia tera vivo de manĝaĵo kaj trinkaĵo.

8) La komuneco kun Dio kiu anonciĝas al ni en tiu vorto ŝanĝas la pasintan malbonon en bono; repacigo fariĝas ebla. Ĝi estas vivo eterna por ĉiuj homoj.

Ĉar "Dio en Kristo repacigis la mondon al Si". Pro tio la kredantoj havas esperon por ĉiuj.

La Spirito de Jesuo jam malkaŝe agas ĉie kie la homoj vivas alie ol sub la angoro por si mem.

9) De tiu ĉi fido rezultas jam en nia mondo amo kaj agoj amoplenaj kiuj ne redonas malbonon per malbono sed malbonon per bono kaj bonon per bono.

Ni estas kreataj por tia amo.

Amen

# Unu ringo

MU Binghua, Ĉinio

Iu junulo havis grandan ĉagrenon. Li plendis al sia instruisto: ”Mi ne kapablas ion bone fari. Oni kelkfoje opiniis, ke mi estas netaŭga por ĉio. Mi estas kaj malsaĝa kaj stulta. Do sinjoro instruisto, kion mi nun devas fari?”

La instruisto konsilis: ”Junulo, mi esprimas mian bedaŭron kaj ne povas tuj doni al vi ian helpon, ĉar nepre devas senprokraste solvi mian propran problemon.” Li faris paŭzon dum la dirado kaj tuj poste daŭrigis: ”Se vi unue helpas min, ĝis mia problemo estas solvita, tiam kredeble mi certe povos helpi vin.”

”Nu,…se mi povas eĉ helpi vin, mi estas glora, sinjoro instruisto!” la junulo respondis tre nememfide.

La instruisto prenis de sia fingro ringon kaj ĝin transdonis al la junulo, dirante: ”Veturu per ĉevalo al bazaro por helpi min forvendi ringon, ĉar mi volas likvidi mian ŝuldon. Vendu ĝin kontraŭ alta prezo, ĝi kostas minimume ormoneron.”





Kun la ringo la junulo alvenis al la bazaro kaj prezentis ĝin antaŭ preterirantojn. Multaj vigle rigardis la brilan ringon. Sed, kiam la junulo montris altan vendoprezon de la ringo, iuj mokis lin, aliaj asertis, ke li estas frenezulo, kaj estis nur maljunulo, kiu bonkore klarigis al li, kiom granda valoro estas unu ormonero; lia ringo ne meritas interŝanĝon kontraŭ ormonero. Dum la vendado, iu intencis interŝanĝi lian ringon per arĝentmonero kaj kupraĵoj ne altvaloraj, sed la junulo bone memoris pri la ripeta admono de la instruisto kaj rifuzis tiun aĉetanton.

Vole nevole la junulo devis surĉevale reveni. Li malĝoje diris al la instruisto: “Pardonu min, ke mi ne interŝanĝis por vi unu ormoneron. Kvankam mi ja povus gajni du aŭ tri arĝentmonerojn post la vendo de la ringo, tamen mi preferis restigi ĝin.

”Junulo,” ridetis la instruisto, ”antaŭ ĉio ni devas scii la veran valoron de tiu ringo. Denove vi surĉevaliĝu kaj rajdu al juvelisto. Diru al li, ke mi volas vendi la ringon kaj demandu lin, kiom da

mono li povas pagi por aĉeti ĝin. Sed, kiel ajn, spite ke li permesos ion ajn, ne vendu! Revenu certe kun la ringo!"

La junulo iris al la juvelisto. Post kiam tiu sperta komercistso pri juveloj, pere de lamplumo kaj lupeo, zorgeme kontrolis la ringon, li afable diris: "junulo, sciigu vian instruiston, se li nun esperas forvendi la ringon mi volas pagi 58 ormonerojn." La junulo timis kredi eĉ siajn orelojn. 58 ormonerojn estis por li granda nombro. Li estis surprizita.

"Efektive mi ankaŭ scias, ke, se oni iom atendas, eblos vendi kontraŭ 70 ormoneroj. Sed mi vere ne scias, ĉu la instruisto urĝe bezonas vendi ĝin…" aldonis la juvelisto.

La junulo instigite kuris al la hejmo de la instruisto kaj anoncis al li la vortojn diritajn de la juvela komercisto.

Aŭskultinte la rakonton de la junulo, la instruisto diris trankvile: "Junulo, vi similas al tiu ringo kaj estas unu el la tre valoraj juveloj. Sed, nur vera spertulo kapablas trovi vian valoron. Ni ĉiuj estus kvazaŭ tiu ĉi ringo kaj ni devas nin mem alte taksi. Ĉiam kaj ĉie ni ne perdu la kuraĝon! Samtempe ni devas ankaŭ streĉi niajn pensojn kaj agojn, por ke tiuj personoj, kiujn ni renkontas kaj eĉ se tiuj ne estas spertuloj, havu eblecon trovi veran valoron.

## La Dia Telefonnumero!

Certe vi konas la psalmon kun la telefonnumero de Dio: 5015!

Voku Min en la tago de mizero;
Mi vin liberigos, kaj vi Min gloros

Rufe mich an am Tag der Not;
dann rette ich dich und du wirst mich ehren.

Call upon me in the day of trouble;
I will deliver you, and you will honour me.

Alors tu pourras m'appeler au jour de la détresse:
je te délivrerai, et tu me rendras gloire.

# Ne licas ŝanĝi kion Kristo mem konstituis

Armando ZECCHIN, IT

Ne validas por la katolika eklezio la bapto servita "en la nomo de la Kreinto, de la Elaĉetinto kaj de la Sanktiganto", aŭ per la formulo "Mi vin baptas en la nomo de la Kreinto, de la Liberiganto kaj de la Subtenanto". Tio asertas decido de la Kongregacio por la doktrino de la kredo, ĵus publikigita de la vatikana gazetara salono, klariganta dubojn stariĝintajn inter katolikoj, koncerne la unuan el la sakramentoj, kiam estas utiligataj tiuj du novaj formuloj.

> "en la nomo de la Kreinto, de la Elaĉetinto kaj de la Sanktiganto"

La praktiko, ekuziĝinta en iuj landoj uzantaj la anglan lingvon inter anglikanoj, luteranoj kaj presbiterianoj, devenas de la tieldirita feminisma teologio, kiu sin servas je tiuj novaj nomoj por eviti diri "patro kaj filo", opiniataj vortoj masklismaj, Sed tiel farante, substrekas tiu Kongregacio, oni renversas la kredon je la Triunuo. Ne temas, fakte, nur pri lingva kverelo: la du formuloj ne validas ĉar ili ne respektas la kristan volon, kaj ne evidentigas la alvokon al la Triunuo en la preĝesprimo ne sufiĉe distinganta la tri personojn per la respektivaj nomoj. La Eklezio, fakte, ne rajtas ŝanĝi kion Kristo mem ordonis. "Tial la bapta formulo devas taŭge kaj eksplicite esprimi la kredon triunuecan". Kaj tiu kredo ne estas tiamaniere esprimata kiam estas indikataj la diaj Personoj per nomoj "komunaj al la tri", kiel okazas en la supre priskribitaj formuloj. "Ĉiu el la tri personoj, fakte, estas Kreinto, Sanktiganto, Subtenanto", dum la bibliaj nomoj konceptigas veran distingon karakterizan: la filo ne estas patro, kaj la patro ne estas filo, ekzemple.

La problemo prezentiĝas super ĉio por baptitoj laŭ tiuj formuloj kiuj, el tiuj konfesioj volus fariĝi katolikaj. "Ĉiukaze necesas rebapti la kandidaton laŭ la tradicia formulo", konkludas la kongregacia respondo.



Baptujo en provinca sveda preĝejo

# Montrinte ADORU-kantlibron

El germana tradukis Siegfried KRÜGER, DE

Grete Burkhardt, la vidvino de inter kristanaj Esperantistoj ne forgesita edzo Adolf, partoprenis kristanan konferencon en Bad Boll, Germanio. Partoprenis ankaŭ la rumana, ortodoksa teologo d-ro Vasile Hristea, kaj ili hazarde iomete babilis. Grete, fiera pro ADORU, kiun Adolf kunredaktis, montris al d-ro Hristea la Krisostomo-liturgion en ĝi. Tio ege impresis lin, kaj li deziris aĉeti la libron. Grete sendis al li la libron donace kaj ricevis jenan leteron:

Kara Sinjorino Burkhardt,

vi sukcesis perfekte surprizi min! Ke pasinta "small talk" en Bad Boll instigis vin, per tiel ĉarma donaco revivigi ĝin, plenigas mian koron kun feliĉo kaj ĝojo.

Profunde impresis min, pere de ĉi tiu kantlibro, ricevi konon pri la enorma engaĝo kaj la senborda laboro de via edzo, sinjoro Adolf Burkhardt: Lia laboro en la servo de Ekumeno, la organizo de la unua komuna Esperanto-kongreso en 1968, la konstruo de la Germana Esperanto Biblioteko en Aalen kaj ne laste ADORU, la Diserva libro, kiun mi nun lernas tre estimi ...

Sen arda vizio, kiel ĝi evidente nutriĝis per Adolf Burkhardt, ke kristanoj ankaŭ per la lingvo konsciiĝas je sia unueco en la Sinjoro aŭ, ke homoj pere de la unu lingvo pli bone kaj pli facile povas interkompreniĝi, tiaj verkoj tute ne estus penseblaj! Kia espero je interkompreniĝo kaj paco, je frateco kaj harmonio devis instigi ĉi tiun homon en ĉio lia agado! ...



Respektplena kaj plena de admiro mi kliniĝas antaŭ tiu atesto de mirinda vivo en la postsekvo de Kristo. ADORU akompanos min kuraĝige sur la vojo de mia teologia laboro, kiel signo kaj konfirmo por tio, ke grandaj idealoj estas realigeblaj.

Kara Sinjorino Burkhardt, mi prenas ĉi tiun okazon, danki al vi elkore pro la valora donaco! Restu vi sana kaj vitala en ĉi tiu bela tempo, kiam la printempo tiel milda sin anoncas. Se via vojo gvidos vin al Tübingen, ne hezitu informi min, eble ni povus kaftrinkante en la bela universitaturbo daŭrigi nian konversacion.

En Kristo ligita

Vasile Hristea

# Lutero estos rehabilitata

Kontribuis K H SCHAEFFER kaj S KRÜGER, DE

Romo – Papo Benedikto XVI. volas rehabiliti laŭ informoj de Londona gazeto “The Times” la reformatoron Martin Luther (1483-1546). La papo volos deklari en Septembro, ke Luther, kiu en la jaro 1520 de papo Leo X. (1475-1521) estis ekskomunikata, ne estis eraranta doktrinulo. Li ne volis siatempe dispartigi la eklezion, sed nur purigi ĝin de koruptaj praktikoj.

La raporto en la interret-eldono de Times sin apogas al fontoj en la Vatikano. Laŭ ili la papo volos diskuti sian vidon pri Luther en somero dum la jara teologia seminario kune kun ĉ. 40 teologoj el la t.n. “Ratzinger-disĉiplaro” en la rezidejo Castel Gandolfo.

> “Ni povas multon lerni de Luther, komencante per la signifo, kiun li atribuis al la vorto de Dio”

Times-korespondanto Richard Owen citis ankaŭ la prezidanton de Papa Konsilio por Stimulado de Unueco de Kristanoj, kardinalon Walter Kasper. Laŭ ties vidpunkto klarigo de papo al nova taksado de Luther povus stimuli la ekumenan dialogon inter Protestantoj kaj Katolikoj. Tio cetere povus formi, laŭ la Times, kontraŭpezon al Vatikano-dokumentoj, kiuj malebligas al la evangeliaj eklezioj samrajtan statuson kaj konsideras ilin nur kiel “ekleziaj komunumoj“.



Marteno Lutero

Sekve de Times, Kasper pledas, gajni pli pozitivan aspekton de Luther: “Ni povas multon lerni de Luther, komencante per la signifo, kiun li atribuis al la vorto de Dio”. La reformoj de Luther kaŭzis antaŭ 500 jaroj vere la papan koleron, sed oni hodiaŭ povus ilin rigardi kiel antaŭvideblajn aspektojn de reformoj, kiujn la eklezio iom post iom akceptis.

Luther provokis la papecon kritikinte akre la indulgenco-praktikon en siaj 95 tezoj de 1517 kaj volis meti la Biblion en la centron kiel unusolan fonton de kristana aŭtoritato. Pere de lia traduko de Biblio germanen li ebligis alireblon al ĝi por la vasta loĝantaro.

[Idea] (evangelia pres-agentejo)

# Kuriokardinalo Walter Kasper alvokis ĉiujn kristanojn al nova ekumena ekiro

Kontribuis K H SCHAEFFER kaj S KRÜGER, DE

Ekumeno kiel la unueco de la eklezio estu la sola ŝanco , savi la modernan eraon antaŭ detruo per si mem“, diris en Februaro 2008 Kasper en la luterana preĝejo “Michel (miĥel)“ en Hamburgo. La kardinalo estas ekde la jaro 2001 kiel prezidanto de papa konsilio por ekumeno kvazaŭ la “Ekumeno-ministro” de Vatikano.

Multaj historiistoj estus en tio samopiniaj, ke la sekularigo estis sekvo ankaŭ de disfalo en konfesioj. Tial estas la demando al Dio la “centra ekumena kaj komuna provoko” kaj avertis pri eklezia kaj konfesia profil-neŭrozo, kio estas ŝajne nuntempa tento ĉe ĉiuj flankoj. Tio ne estus esprimo de forta, sed timon enhavanta malforta kredo.

Pli frue temis ofte pri “misio de paganoj”. “Tio ne estas hodiaŭ nia situacio”, diris Kasper. La reala problemo estus la indiferenteco kaj malkresko de nia propra kredo. La perceptado de Kristanismo estas malklara, malpreciza kaj pala. “Ĉiuj ankoraŭ grandiozaj penegoj ekŝanceliĝos kaj disfalos, se la komuna fundamento disfalemos”, admonis la kardinalo.

Li avertis antaŭ la falsa modernigo kaj antaŭ malkuraĝa, malforta adapto al la nuntempa vivo-filozofio. Validus meti Dion en la mezon. Ĉar Ekumeno ne estus persona opcio. Ja estas mandato kaj sankta devigo, kion Jesuo mem donis al ni dum la vespero antaŭ sia morto kiel testamenton por ni.

La fina celo de Ekumeno ne estas la reveno de ĉiuj kristanoj “en la sinon de rom-katolika eklezio”, akcentis Kasper. Tie ĉi devos ekesti io tute nova.

[jesus.de/epd]

ꕤ

Ne forgesu mendi pli da preĝlibretoj. Donu al geamikoj aŭ kunportu al viaj landaj jarkongresoj! Tiel vi helpas al la laboro de EVIDENTE.

Vi mendas la libreton ĉe la sekretario de KELI kaj la prezo estas laŭ libervola donaco.

Mendu ĉe Pavel Polnický;
Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
+420 325 615 651;
cea.polnicky@quick.cz



# Eroj el Dia Regno 1938

Partoprenante en la kongreso en Piliscsaba 2005, mi ekaŭdis pri la Fajszi Kolekto de esperantaĵoj. Serĉante materialon pri la historio de Dia Regno la kolektaĵo estas ege bona fonto. Mi havis eblecon viziti la bibliotekon kaj serĉi en malnovaj ekzempleroj kaj trovis i.a. artikolojn el la 1938 jarkolekto. Espereble vi povas bone legi, kvankam la malbonaj fotoj. La sekva teksto estas "tondita" el Vikipedio.

FAJSZI Károly (1911-2004) havis la kvaran plej grandan kolekton de esperantaĵoj (post Internacia E-Muzeo en Vieno, Biblioteko Butler de Esperanto-Asocio de Britio kaj Biblioteko Hector Hodler de UEA).

Li estis poŝtoficisto en Hungario. Li lernis Esperanton en 1964, preskaŭ tuj fariĝis pasia kolektanto. Por financi siajn aĉetojn, li iom post iom vendis siajn posedaĵojn. Li opiniis posedi ĉ. 95 procentojn de ĉiuj Esperantaj eldonaĵoj aperintaj ĝis la 1970-aj jaroj, sed poste, precipe ekde 1990, la monmanko malhelpis lian kolektan kaj interŝanĝan agadon. En lia ĉ. 40-mil-era kolekto estas 13 miloj da libroj, 18 miloj da periodaĵoj kaj miloj da diversaĵoj.

La kolekto de Fajszi ricevis en 1982 ŝtatan protekton, Tiun ĉi kolekton aĉetis la hungara ŝtato en la jaro 2001 celante transdoni ĝin al la Tutlanda Fremdlingva Biblioteko de Hungario post la morto de Fajszi.

❧

## LA LELI-KONGRESO LAŬ EKSTERULA VIDPUNKTO

„La mondo observas nin", diras prave la esperantistoj. „*La esperantanoj* (= la anaro de Esperantujo) *observas nin*", same prave povas diri la KELI-anoj. Jen simpatiaj vortoj de la plej eminenta el la pioniroj en Svedlando nun vivantaj, *s-ro Paul Nylén*, vicprezid. de L. K., Akad., Ekzaministo en Sv. Esp. Inst., Sthlma, Honora membro de U.E.A. kun honormedalo, Honora membro de IEL kaj Honora membro de IEMW.

„Oni petis min diri per kelkaj vortoj mian impreson de la partopreno de KELI je la Jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio en aŭgusto pasinta. Mi tre volonte tion faras, kvankam mi ne havas multon por raporti, ĉar mi devis ja en la daŭro de la kongresa semajno senĉese partopreni jen unu jen alian aferon kaj malmulte estis libera por ĉeesti tion kaj alian laŭ mia propra deziro.

En la dimanĉo la 9-a horo matene, okazis en la preĝejo ĉe strato Leszno 16 protestanta Diservo, gvidata de s-ro Malzmann el Lôdz, kiu

ĜNO

iaris bonan predikon antaŭ multnombra kunvenintaro internacia, inter kiu oni vidis multajn skandinavojn. Pro la granda distancoj kaj la malfacilo por fremdulo trovi la lokojn, mi bedaŭrinde ne povis alveni ĝustatempe al la preĝejo, tamen sufiĉe frue por aŭskulti la ĉefan parton de la varmkora prediko kaj kunkanti la finajn himnojn.

Antaŭ la foriro el la preĝejo mi havis ankaŭ okazon interkoniĝi kun s-ro Malzmann kaj ankaŭ poste dum la kongreso interparoli kun tiu ĉi simpatia persono.

Dum la kongresa semajno KELI servadis ĉe speciala tablo en la kongresejo (apud la poŝto), kie fidele deĵoris s-ro Malzmann kaj kelkfoje la sekretario fr-ino Inga Kristoffersson el Stockholm.

En la ferma kunsido de la kongreso fr-ino Kristoffersson ankaŭ antaŭlegis raporton pri la laboro de KELI dum la jubilea kongreso, kaj la kongresa sekterario metis ĝin al la aktoj.

De ĉio nun aludita mi ricevis la impreson, ke la KELI-anoj plenumis en la kongreso sinceran kaj fruktodonan kontribuon al la harmonia kunlaboro de la kongreso.

Huddinge (Stockholm) en jan. 1938.

Paul Nylén,

Vicprez. de la jubilea 29-a Univ. Kongreso en Varsovio."

18a JARO · JUNIO 1938 · NUMERO 6

# DIA REGNO

Oficiala ligorgano de **Kristana Esperantista Ligo Internacia**
Celo de la ligo:
**Enkonduko de Esperanto en la internacian protestantan misïon**
Jarkotizo: 6 respondkuponoj (aŭ ned. guld. 0,60).

Adreso de la centra oficejo
IVAR E. KARLSSON
Box 286 Insjön, Svedlando

Redaktoro: H. C. v. Leeuwen, Wijhe, Nederlando
Kasisto: L. Woudenberg, Hildegondestraat 25, Bussum, Nederlando. Poŝtkonto n-ro 6335.

## KANTLIBRO.

La ĉefestraro de la nederlanda Keli-sekcio starigis, laŭ propono de sia haga grupo, komisionon, kiu havas la taskon, esplori la demandon, kiom estos eble, eldoni kristanan kantlibron por internacia uzado.

Baldaŭ la provizora laboro de la komisio povos esti finita. Ni estas scivolaj, kio estos ĝia respondo al la ĉefestraro.

---

## KIO ESTAS „KREDI"?

Ĉu eble havi la certecon de eterna vivo?
Ĉu la konvinkon, ke ekzistas ĉiopova Di'?
Aŭ kredi, ke Jesuo sin oferis por pekuloj?
Eĉ la falinta ĉefanĝel' Satano kredas ĝin.

Vi eble nomas kredi, ĵuri je dogmaro via;
Aŭ se facile ektuŝiĝas la sentema kor',
Vi opinias tion signo de la vera lumo;
Sed tiam vi eraras, kiel multaj en la mond'.

Ne, kredi estas ĵeti sin al dia patrokoro;
Perdiĝi, nepre neniiĝi en la kor' de Di;
Por fine el la ĉirkaŭbrako dia, renaskita
Ekstari kaj laŭdante Dion, vidi en la Lum'.

M. J. WESSEL.

## Informo pri kaj invito al diversaj aranĝoj

## A: Invito al internacia seminario en Karlovo, Bulgario

**La rolo de la religio por la evoluo de la homa civilizacio kaj kulturo**

Festivalo de religia kanto

03.06-09.06. 2008

**LOKO** de la seminario: Karlovo estas situanta en la centro de Bulgario/150 km de Sofio, 60 km de Plovdivo. Ĝi estas facile atingebla vagonare kaj buse de Sofio kaj Plovdiv. Karlovo estas ankaŭ facile atingebla de Burgas kaj Varna. Por interesuloj kaj aliĝontoj ni sendos precizan horaron de vagonaroj kaj busoj ekveturantaj de Sofio, Plovdiv, Burgas kaj Varna .

**KONFERENCEJO:** la kunsidoj okazos en la Internacia Universitato Karlovo

**TRANOKTOJ:** en komuna loĝejo / 6 eŭroj por unu tranokto/
en privataj domoj-/ 7 eŭroj por unu tranokto/
en hoteloj- /20-30 eŭroj por unu tranokto/

**NUTRADO:** libervola en la bufedo de la Universitato kaj en la proksimaj malmultekostaj restoracioj. La nutrado en Bulgario estas malmultekosta. En nia bufedo la prezoj estas: kafo/teo 0,2 eŭroj, biero 0,4 eŭroj, sandviĉoj 0,7 -1 eŭro k.t.p.

**EKSKURSOJ**- libervole: al Karlovo-Sopot (senpaga) kaj al Karlovo- Plovdiv Baĉkova monakejo- 12 eŭroj/aldone pagotaj surloke

**ALIĜKOTIZO**- 6 eŭroj/pagota surloke/

**INFORMO kaj ALIĜO:**

Bulgario 4300; Karlovo; p.k. 44 Internacia seminario
Telefono : +359 885056469 /prof. Leonov/

**LIMDATO por ALIĜO:** 25.05.2008

## B: Renkontiĝo de mezeŭropaj protestantaj kristanoj

27.-29. 6. 2008 en Bratislava, Slovakio

KELI planas partopreni. Ni antaŭvidas informan standon kaj eble eĉ diservon en E-o. Interesatoj rapide skribu al sekretario Pavel Polnický (vidu adreson ĉe la sekretario sur la dua paĝo).

## C: Bibliaj tagoj dum 2008

**1. Bibliaj tagoj 2. aŭ 4. - 6. julio 2008**
**en Herzberg, la Esperanto-urbo en Germanio**

Oni povas veni merkrede, 2. 8. aŭ vendrede, 4.8.

Temo estas la uzo de la nova BIBLIO kaj kantoj el la ekumena Preĝ- kaj Kant-libro ADORU. Partoprenkotizo 30 eŭroj.

Nia kunvenejo estas Hotelo Jägerhof, Sägemühlenstr. 34.

Tranokto tie kostas en dulita ĉambro 30 - 35 eŭrojn por unu persono kaj unu nokto inkluzive la matenmanĝo. Unulitaj ĉambroj kostas malmulte pli. En proksimaj privataj ĉambroj kostas la du-lita ĉambro ĉ. 20 eŭrojn por unu persono sen matenmanĝo. Unulitaj ĉambroj kostas malmulte pli. La manĝojn ni ricevas á la carte en la Hotelo Jägerhof, kaj ĉiu pagas, kion ŝi aŭ li manĝas.

Post la eniro de la partopren-kotizo de 30 eŭroj en konto 211 93 704 Bernhard Eichkorn, Postbank Stuttgart BLZ 600 100 70 el Ne-Germanio IBAN: DE95 6001 0070 0021 1937 04 BIC: PBNKDEFF aŭ al la UEA-konto echk-x (tiuokaze via aliĝo validas tuj, kiam mi ricevos vian informon).
Vi ricevos informon, se vi aliĝos antaŭ la 20a de Junio 2008.

**2. Bibliaj tagoj 20. - 24. oktobro 2008**
**en klostro Nütschau en Travebrück, Germanio**

La benediktana klostro Nütschau estas la spirita centro en la arkidiocezo Hamburg. Frato en la klostro Nütschau estas nia Esperanto-amiko Willibald Kuhnigk. Li gvidos bibliajn kursojn pri la psalmoj de la nova BIBLIO, kaj ni kantos el la ekumena Preĝ- kaj Kant-libro ADORU kaj partoprenos Diservojn de la benediktanaj patroj. La prezoj estas similaj al la prezoj de la kurso en Herzberg, la Esperanto-urbo. Intresiĝantoj turnu sin al la suba adreso

Aliĝojn kaj informojn pri la bibliaj tagoj vi petas ĉe:
Pfr. i. R. Bernhard Eichkorn
Romäusring 20; D 78050 Villingen-Schwenningen
eichkorn.b@t-online.de
www.Bernhard-Eichkorn.de

# Informetoj

La ekumena diservo kadre de la UK en Rotterdam okazos la 20-an de julio, je la 16.30-a horo en la Remonstranta preĝejo, Museumpark 3, 3015 CB Rotterdam. Ni mendis la preĝejon inter la 16-a kaj la 18-a horo.

Pastoro Gerrit Berveling el Nederlando traktis la aferon kun la preĝejo. Ni ĝojas ke patro Peter Knauer SJ el Bruselo konsentis pri deĵorado. Gerrit traktos la liturgion kun li.

Salutas, Els van Dijk-Kuperus


Tre estimata samideano, mi volas informi vin pri la jeno: En aprilo 2007 aperis en Hamburgo (en BUSKE-eldonejo) mia nova ***Granda Vortaro Germana-Esperanta.*** Ĝi estas la plej ampleksa iam aperinta Esperanto-vortaro en la mondo: 1679 paĝoj kun pli ol 160.000 serĉvortoj.

Ĝi enhavas ankaŭ enorman parton da fakvortoj pri ***fervojo*** (kunlabore kun fakuloj de fervojaj aferoj) kaj ***kristanismo***. Supozeble vi interesiĝas pri la vortaro. Pliajn detalojn vi povos ekscii alklikante www.buske.de (kun plia serĉo: *Esperanto*). Kun afablaj salutoj de (la aŭtoro)

Prof. Erich-Dieter Krause.

---

## 58-a kongreso de KELI




28. 7. – 4. 8. 2008 (notu: lundo ĝis lundo!)

Pli da informo ĉe la sekretario:
Pavel Polnický,
Na Vinici 110/10; 290 01 Podìbrady, Ĉeĥio
Telefono: 420 325 615 651
E-mail: cea.polnicky@quick.cz

### 3-a listo de aliĝintoj:

| | | |
|---|---|---|
| 43. | Bajnoczi Veronika | Hungario |
| 44. | Landfors Matts | Svedio |
| 45. | Landfors Anna | Svedio |
| 46. | Humpová Jaroslava | Ĉeĥio |
| 47. | Szubryczyňska Grazyna | Pollando |
| 48. | Kaminský Matej | Slovakio |

# Ili pace protestas ĉiujn tagojn ekde la 26a de aprilo 2007, eĉ en Esperanto!

Ĉiujn tagojn ekde la 8a matene, ili estas tie kun siaj aviztabuloj antaŭ la sidejo de la Monda Organizo pri Sano (MOS), kaj ili restos tie ankoraŭ monatojn kaj probable jarojn, ĝis ili estus aŭskultataj! Tiuj reprezentantoj de multaj internaciaj Ne-Registaraj Organizoj (NRO) petas:




- ke la MOS ĉesigu (aŭ ŝangu) la akordon, kiun ĝi kontraktis en 1959 kun la Internacia Atomenergio Agentejo (IAEA), kies komisio estas tutmonde disvolvi la uzon de la atomenergio. Tiu akordo malpermesas al la MOS publiki ajnan studaĵon se la IAEA ne konsentas!
- ke la MOS reprenu en siajn manojn ĉiujn problemojn, kiuj rilatas la uzon de la atomenergio kaj nia sano,
- kaj ke finfine, ĝi akceptu publikigi la veran bilancon de la eksplodo en Tchernobyl la 26an de aprilo 1986, eĉ se tio malplaĉus al IAEA, kiu ĝis nun estas juĝanto kaj juĝato.

Ekzemple, kiam tre multaj scienculoj kaj tiuj NRO pensas, ke la vera tempobalanco estos inter 50 kaj 200 000 mortintoj, la IAEA (do la MOS!) sciigas maksimume pri 4000 mortintoj (poste sciigis nur kelkaj dekoj dum multaj jaroj!). Plie, permesi, eĉ devigi la loĝantarojn resetli en radioaktivpoluaj regionoj estas krimon.

Fine konkludas la manifestantoj, se ekzemple en via lando vi havus la povon kaj la moralan respondecon bilanci la antaŭvideblan nombron de mortintoj ligitaj kun la cigaredfumado, ĉu vi petus la cigaredfabrikistoj, por ke ili mem taksus la nombron de mortintoj pro la cigaredoj, kiujn ili vendas ? Kompreneble la rezultoj estus, ke ĉio iras bone en la plej bona mondo, kaj ke ĉiuj devus fumi por esti pli feliĉaj! ℘

# Sen Dio mi estas...

Sen Dio mi estas fiŝo ĉe bordo,
sen Dio guto en la ardaĵo,
sen Dio mi estas herbo en la sablo,
kaj birdo, kies flugiloj ripozas.
Se Dio min vokas ĉe mia nomo,
mi estas akvo, fajro, tero, aero.

Tradukis Siegfried KRÜGER



**Ohne Gott bin ich ein Fisch am Strand,
ohne Gott ein Tropfen in der Glut,
ohne Gott bin ich ein Gras im Sand,
und ein Vogel, dessen Schwinge ruht.
Wenn mich Gott bei meinem Namen ruft,
bin ich Wasser, Feuer, Erde, Luft.**

**Jochen Klepper**